

AVENO 35 - AVE: Agado, Kunvenoj, Subskribindaj Peticioj kaj Raportoj

Aveno 2010-09-30

Junuloj de AVE kontaktis FYEG/FJEV (**Federacio de la Junaj Europaj Verduloj**) por akcepti la tradukon de la ĝenerala politika teksto de FJEV sur ilia retejo. Ilia sekretario jam respondis pozitive - pro shanghe de la retejo povas daŭri ankoraŭ iom da tempo.

Chiukaze tiu teksto jam estas legebla sur nia retejo: <http://www.verduloj.org> (maldekstra kolono, ...)

Aparte interesa estus por AVE ekscii kiom da niaj membroj estas junaj verdpartianoj (ghis la 30a jaro). Ni jam scias pri tiaj en Finnlando, Germanio kaj Pollando.

Se en via lando ne ekzistas verda partio - bonvolu tamen respondi.

Se vi estas juna (ankau se ne plu juna) - kaj ankoraŭ ne membro de verda partio - bonvolu pripensi la membrighon. La akcepto de Esperanto ankau dependas de nia interplektigho en la verdaj partioj.

Bonvolu respondi al la AVE-sekretario: ave@verduloj.org au manfred@westernmayer.de

2010-09-30, Stuttgart, Germanio: Nekredebla **brutaleco de polico** kontraŭ pacema -sed ne pia - manifestacio en demokratia ŝtato - okazis hodiaŭ vespere en Stuttgart. Tagmeze ili vundis manifestacion de lernantoj, vespere plenkreskulojn per forta akvo-pafoj, piprajho kontraŭ la okuloj kaj batoj.

Temas pri "Stuttgart 21" - ege multekosta renverso de la kapa stacidomo de Stuttgart, por rapidigi la vojaĝojn je 8 minutoj. Grandegaj arboj en granda parko apud la stacidomo devas esti faligitaj, kaj tio komencas nun (meznokte). Ekzistas alternativa plano kun granda akceptemo de la homoj: K21 <http://www.kopfbahnhof-21.de>

Aveno 2010-09-21

Monda sociala forumo 2011 en Dakar

traduko de la ĝenerala informo en Esperanto:

http://www.forumsocialmundial.org.br/noticias_01.php?cd_news=2808&cd_language=1

La pola Verda Partio subtenas la agadon de Greenpeace / Verdpaco Pollando:

petas subteni la peticion por protekti la grandajn naturparkojn en Pollando - aparte temas pri Bielaweshcha Pushcha (praarbaro de B.), kie vivas bisonoj, alkoj kaj ursoj (parte en heghoj). Krome tiu parko estas unika, ĉar ghi etendighas al du landoj: Pollando kaj Belorusio.

Ili devas kolekti 100.000 da subskriboj por ke la parlamento traktos la aferon.

<http://www.zieloni2004.pl/art-3797.htm>

<http://tydecydujesz.org/>

Nova grupo kiu agadas en la sfero de rughaj kaj verdaj (socialaj-ekologiaj) partioj:

Institut für Solidarische Moderne

En Germanio nun temas pri la shangho de legho por fini la eraon de atomenergio, sed la nigra/flava (kristana/libereca) registaro pli subtenas la interes/z-ojn de la 4 oligopolaj atom-konzernoj: Pri la minaco al demokratio vi jam povas legi sur nia retejo <http://www.verduloj.org> (je "energio").

Do, por germanlingvanoj: <http://www.solidarische-moderne.de/de/topic/50.aufruf.html>

2010-09-10/12, Lingvopolitka Semajnfino de GEA, St. Andreasberg (Harcmontaro)

AVEanoj estas invitataj partopreni. Ni ja ankoraŭ ne trovis kontakt-personon de la frakcio

Verduloj/Regionalistoj/Piratoj en la EP, do, devus ekscii kaj perlabori argumentojn por konvinki ilin. Jam ekzistas ligoj de verdpartiaj ret-paghoj al Esperanto-tradukoj de iliaj dokumentoj.

2010-11-19/21, Germana Verdpartia Kongreso (BDK), Freiburg (Brejzgau).

Mi petas la germanajn kaj najbarajn AVE-anojn partopreni*, ĉar en la politiko validas ne nur vizio sed ankau la nombroj kiuj subtenas la vizion. La temo ne estas Europo, sed certe alvenos MEPOj.

AVE ricevis la rajton prezenti Esperanto je informstano por montri ke Esperanto taugas por la politika sfero, kaj ke multaj esperantistoj estas verduloj kaj simpatiantoj ;) - familia loghado ofertita.

Bonvolu anonci vin - almenau provizore: Manfred@Westernmayer.de

Aveno 2010-08-15: **Monda Asembleo Socia (MAS)** prezentas en Esperanto: <http://www.mas-eo.org/>

Bulteno de la Monda Socia Forumo, julio 2010

1. Monda Forumo de transformaj kulturo kaj edukado,
2. Socia Forumo Ameriko
3. Monda Forumo pri edukado en Palestino,
4. Survoje al Dakaro : strategia debato
5. Kalendaro 2010
6. MSF rete

MONDA SOLIDARECO KONTRAŬ LA MALSATO:

evolu-subtena asocio plurlingva (en, eo, fr) kiu finansas mutuale elektitajn (kooperativajn) projektojn en Afriko (eo) <http://www.Globidar.org>
Poŝta ĝirkonto : CCP PARIS 10 734 96 Z, IBAN: FR2120041000011073496Z02056, BIC : PSSTFRPPPAR

Subskribi postulojn **Protekti la Pluvarbaron / kaj pri Bestaj Rajtoj** je ilia bredado:
(de) <http://www.regenwald.org>
(diversaj lingvoj) <http://www.regenwald.org/links.php?rub=3> , (dankon al Kurt Fischer)

Tutmonda Esperantista **Vegetarana Asocio**: www.ivu.org/teva .
www.facebook.com/pages/Tutmonda-Esperantista-Vegetarana-Asocio/337966255388 (informo de Neil)

Filmetoj, Prelegoj - en Esperanto (almenau subtekste):
http://www.ted.com/talks/lang/eng/al_gore_warns_on_latest_climate_trends.html
http://www.ted.com/talks/lang/eng/graham_hill_weekday_vegetarian.html

Ĉar la uloj parolas rapidege, indas scii, ke ekzistas paŭzo-butono, kiu post alklako ŝanĝiĝas en startbutonon.
Tio plifaciligas la legadon de la subtekstoj. Amike salutas Leo

2010-08-20/22, Dandong, 6-a Nordorienta Ĉina Kongreso de Esperanto
AVE intencis saluti kaj bondeziris aparte por kontakti la najbaran nordan Koreion.
S-ro Wu Guojiang - ankau se temas pri urbo-partnereco uzante Esperanton: ghemelurboj@yahoo.com.cn

2000-2010 estas la **Jardeko de UN por Paco kaj Senperforto**.
Ĉar la mondo daŭre bezonas agadojn tiucelen, ni proponas al vi, ke ĉiuj el ni klopodu sugesti al siaj reprezentantoj proponi al UN novan jardekon por Paco kaj Senperforto 2010-2020.
NRO je kiu Mirejo tre kunlaboras: <http://www.alvoko-al-mondpaco.org/>

Mirejo sendis la raporton: Kunsido de Verduloj dum KAEM kongreso en Ulan Batoro, Mongolio, Junio 2010
Gvidis kaj informis ĝenerale Mirejo Grosjean (kaj raportis)
Ĉeestantoj (ch. 20) el Aŭstralio, Koreio, Japanio, Italio, Svislando, Francio, Ĉinio, Tajvano, Finnlando-Francio.

Proponoj por pli efike vivi protektante la medion :

- Trinki kranan akvon se eblas.
- Manĝu legomojn kaj fruktojn el proksimaj kreskigejoj.
- Ŝparu akvon.
- Uzu pluvakvon por necesejo aŭ akvumado k.s..

Proponoj por pli efike informi, agadi, konvinki:

- Serĉo de informoj por pli racie agi
- Lobiado.
- Bojkoto
- Manifestacio marŝante
- Manifestacio sidante
- Muziko kun politika enhavo, kantoj, teatraĵoj
- Silanta staro, kun kandeloj
- Peticioj
- Kunlaboro kun avaaZ
- Uzo de neĝamasoj por pentri sloganojn sur ili.

Komento de AVE/manfred: bedaŭrinde ne cheestis mongoloj, por raporti pri naturmediaj problemoj en sia lando.
Pri la kunlaborado - bona listo, indas - AVE jam "ofte" sendas agad-petojn de AVAAZ kaj aliaj.
Karaj, la **kunveno de verduloj** (AVE), je la 23-an de julio 2010 en Havano, (UK) okazis:
ekde la 14:45, do en sufiche favora horo, sub la sentenco:

„El la vidpunkto de pli alta ekonomia soci-formacio la privata proprieto de unuopaj individuoj je la terĝlobo aperos tute same absurda kiel la privata proprieto de homo je alia homo. Ech tuta socio, nacio, ja ech ĉiuj samtempaj socioj kune, ne estas proprietoj de la tero. Ili estas nur ĝiaj posedantoj, ĝiaj uzantoj, kaj ili devas kiel bonaj familiaj patroj postlasi ĝin plibonigita al la sekvaj generacioj.” (Karlo Markso, La kapitalo, 3-a vol.)
La cheestantoj starigis jenan tagordon:

1. Raportoj pri la verdaj partioj al E-o en diversaj landoj
2. Alternativaj energioj (vent-, sun-, ondo-energio)
3. Nafto-vershigo en la Meksika Golfo
4. Ekologio kaj malegaleco, korpa laboro kaj nekorpa laboro, auto kaj biciklo
5. Ekologio en Havano
6. Etskalaj projektoj kulturaj, paralela ĝardenkulturado, intershangho de servoj

Ĉar Manfred Westermayer ne povis veni al la UK, mi (**Vilhelmo Lutermano**) transprenis la taskon enkonduki la renkontighon. Mi atentigis pri la freshe eldonita libro

"Kien la klimato? Post Kopenhago kaj Kochabambo. Eseo" kiu i.a. pritraktas la problemon ke unuflanke necesas shanghi niajn ĝeneralajn vivmanierojn (i.a. redifino de bezonoj, redukto de nenecesaj konsumoj) kaj aliflanke la ekonomia kresko estas esenca vivkondicho de la kapitalismo, kaj ke do kun ghi la klimato ne saveblas.

Ni tamen ne daurigis tiun temon, sed, stariginte la supre menciitajn temojn, raportis el diversaj landoj.

Bedaurinde, la raporto pri la kunveno en la kongresa bulteno "Havana Kuriero", pri kiu taskis sin unu el la cheestantoj, ne aperis.

Pri la 1-a punkto oni raportis ia. el Kanado, Israelo, Pollando, Germanio, Francio, Japanio;

pri la 2-a punkto oni raportis i.a. pri la impresa multeco de ventenergiaj elektrigiloj en Svedio (kie tamen chefas la akvo-energio), pri sunenergio en Israelio.

Pri la 3-a punkto oni raportis, ke la problemoj shajnas nun esti solvita, sed ke la sekvoj dauros ankoraŭ jardekojn kaj parte estas neripareblaj.

La 4-a punkto tushis la necesan shanghon de niaj viv- kaj konsum-manieroj, la utilon por la korpa sano uzi korpan movigheblecojn (piediradon, bicikladon ktp) anstataŭ motorajn (auton ktp), ktp - vivprincipo kiu tamen trafas sur energia rezisto de la automobilindustrio.

Pri la 5-a punkto partoprenanto, kiu multe piediris tra Havano, riprochis ke en kelkaj kvartaloj de Havano ne estas fruktaroj (per kiuj la loghantaro povus parte nutri sin kaj kiuj krome donus ombrojn). La tempo mankis por prezenti kaj diskuti pri ekologiaj projektoj de Kubo;

pri la lasta punkto, etaj projektoj ĉe la domoj, oni raportis pri komposhtado por anstataŭigi hhemiajn sterkajhojn - interalie vaste uzata en Kubo, sed ebla ankaŭ por malgrandaj ghardenoj kaj najbareca solvo de vegetajha rubaĵo.

Por pritrakti la aspekton de intershangho de servoj bedaurinde mankis la tempo.

Entute la diskuto de la (che la fino preskau kvindeko da) partoprenantoj estis vigla kaj interesa.

Vilhelmo Lutermano, kiu aktivis ĉe "Le Monde diplomatique en Esperanto" <http://eo.mondediplo.com> kaj Monda Asembleo Socia (MAS) <http://mas-eo.org>

Esperanto - Linukso de la lingvoj, Linukso - Esperanto de la komputiloj

Aveno 2010-07-08

Someraj Seminarioj, Tagoj, Universitatoj de la Verdaj Partioj en Europo:

vidu la kompletan informojn pri 11 diversaj okazajhoj sur nia retejo (provizore en la angla - traduko venos eble)

Fine de Augusto - verd-ekologia Belgio franclingva: <http://www.etopia.be/>

Oni decidis meti la **chef-stacidomon de Stuttgart en la kelon**. Estas gigantaj kostoj - por shpari kelkajn minutojn; mono kiu mankos por publika transporto en (suda) Germanio. <http://www.kopfbahnhof-21.de/>
Kaj tute grava - la nuna apuda parko (4,4 ha) kun grandegaj arboj estus forhakita. <http://www.parkschuetzer.de/>

Manifestacioj en Stuttgart: chiu lunde, 18-a horo, je la norda elirejo de la Hauptbahnhof

Intertempe pluraj grandaj manifestacioj okazis - kun bone miksitaj popolo kaj plejparte en bona humoro.

Krome kelkaj sieghoj estis faritaj. (Verdulaj parlamentanoj k.a. klopodas konvinki ke tiu koncepto ne indas.

Festivalo de la Tero - Ekologio, Paco, Solidareco

Fondita en 2005, la Festivalo de la Tero okazos (-is) por la sesa fojo la vendredon 25an, sabaton 26an kaj dimanĉon 27an de junio en trideko da urboj de dudek landoj. En Parizo, ĝi okazos en la parko de Bercy
La himno de la festivalo, en Esperanto, estas tuj aŭskultebla, kiam oni klakas sur la adreson de la kvarlingva retejo — franca, angla, hispana, Esperanto :

<http://www.festivaldelaterre.org/>

http://www.festivaldelaterre.org/index_esperanto.htm

Video pri la **Himno de la Tero**, kiun kantas infanoj de la urbo Meaux (mo — ĉe WikiTrans), estas spektebla ĉe :

http://www.dailymotion.com/video/x2ff30_les-petits-chanteurs-de-meaux-esper_music

<http://www.youtube.com/watch?v=RR94x-KMeuA>

(informo dank' al Henri Masson kaj Germain Pirlot)

2010-08-26, Bazelo (CH), **Uranio-Ekspluatado minacas indigenajn popolojn.**

Prelegantoj el la tuta mondo - okaze de IPPNW (kuracistoj kontraŭ la atommilito)

<http://www.nuclear-risks.org/>

2010-08-07, **Lofoten/Vesteralen**, Norvegio: la norvega ekologia movado renkontighos tie por **protesti kontraŭ**

la en-mara nafto-ekspluatado en tiu regiono. La Verda Partio, Miljoepartiet Dei Groene, partoprenos kaj invitas verdulaj geamikojn el eksterlando; ili okazigos someran tendaron tie. Bonvolu kontakti:

Knut Qvigstad (knut.qvigstad@mdg.no) au Sindre Buchanan (sindre.buchanan@mdg.no).

Informo de Øyvind Strømme, Internacia sekretario de MDG.

2010-05-23, Kaiserslautern: **AVE diskutis pri la EU-Agado** (okaze de kuna kongresoj de GEA kaj UFE):

1. chiam proponi la propedeutikan valoron de Esperanto: <http://www.springboard2languages.org/home.htm>

Fora celo estas, ke iam chiuj (europeanoj) havus komunan lingvon por internacia kmunikado.

2. La Europa Junulara Parlamento ghis nun ne akceptas Esperanton. Julia kontaktadas la respondeculojn por trovi kio eblos estonte. Ghi estus eble la plej malalt-sojla eksperimento.

Cem Oezdemir, vira parolanto de la germanaj Verduloj, kiu estis patrono por la EJP en Aprilo, respondis ke li

ne kontraŭ la ideon, sed men ne rajtas decidi. Necesas diskuti kun EJP-konsilio.
Julia ankau elserchus, kiu el la Verdaj MEP-oj pretas partopreni en la interfrakcia Geremek-Grupo.
3. Se kelkaj AVE-anoj partoprenos AVE prezentos Esperanton je la germana Verdula kongreso en Novembro, kiu okazos en Freiburg/Breisgau. Organizati diskut-rondon pri lingva politiko en la EP/EU. Tie ni havus eblecon renkontighi kun MEP-oj.

Per Gahrton, iama MEP de la **svedaj Verduloj**, ne neglektas Esperanton.

Eble iu povas diskuti kun li enkadre de lia Pens-Tanko: <http://www.cogito.nu>

Por nia membro en Kartvelio: Per verkis libron pri la fonaj kauzoj de la lasta milito inter Kartvelio kaj Rusio.

Evolu-helpaj projektoj de esperantistoj en Afriko: <http://esp-evoluo.tk/> kaj <http://www.kono.be/mazingira/>

Aveno 2010-05-07 **Klimata tendaro che Bonn (DE)**:

Lau informoj okazos klimat-tendaro de la 29-a de majo ghis 6-a de junio, kun protestpromeno je la 5-a. Chu jam iu planas fari prelegon/snufet-kurson pri esp-o tie ? Detaloj je <http://www.klimawelle.de>
ghis, Ronaldo, <http://www.esperanto.net>

2010-03-21 Hodiaŭ okazis **granda manifestacio kontraŭ la atomreaktoroj** (5.200 partoprenantoj) en Neckarwestheim - norde de Stuttgart, kaj espereble pli granda okazos omaghe al Chernobil (1986-04-26): 2010-04-24 en Biblis ambau-loke malshaltendaj reaktoroj. Samtempe okazos granda hom-cheno inter du atomcentralaj lokoj (Kruemmel kaj Brunsbuettel) proksime de Hamburgo.

Pliaj informoj pri la okazajho en Biblis: <http://www.campact.de/atom2/kette/biblis>

El Bazelo(Freiburg, Offenburg, Karlsruhe, Heidelberg) alvenos speciala trajno kun 600 da lokoj (partoprenantoj) al Biblis: **Jen la retejo kun informoj pri la bileto**: http://www.campact.de/atom2/kette/zug_basr

Ronaldo mencias ke kreigxis por **organizi kampanjojn** retaj-kampanjoj-por-esperanto@yahoogroups.com aligxo law la konata recepto,

<http://groups.yahoo.com/group/retaj-kampanjoj-por-esperanto>

aw

retaj-kampanjoj-por-esperanto-subscribe@yahoogroups.com

Ekvinokso : Tago de la Mondcivitanoj - Tago de Monda Unueco (Daniel Durand)

<http://www.recim.org/ascop/pr08-eo.htm>

Ghis la 11-a de marto, en la dua fazo ni povas amase vochdoni en la retejo de la usona organizajho Change.org inter la Ideoj por shangho en Usono por la propono de Renata Ventura pri enkonduko de Esperanto kiel dua lingvo en la usonaj lernejoj:

http://www.change.org/ideas/view/obama_introduce_esperanto_as_a_foreign_language_subject_in_schools

La unuajn 10 lokitojn el inter la proponoj Change.org transdonos al la registaro de prezidanto Obama.

Ech se oni ne atingos, ke Esperanto estos instruata en usonaj lernejoj (pri tio ne povas decidi Obama por la tuta lando), chiiukaze, pluraj milionoj da usonanoj per tiu chi vochdono malkovras la lingvon Esperanto.

Ni utiligu tiun chi grandan eblecon por reklami Esperanton!

ALVOKO AL MONDPACO

La civila socio devas movi la mondon.

« Vi devas ESTI la shangho, kiun vi volas vidi en la mondo ! » (Gandhi)

La Reto estas nia ilo. Bv iri al retejo www.alvoko-al-mondpaco.org kaj pripensi pri chiu pasho. Vi decidas klakante. Bv konigi tiun retejon al viaj membroj, amikoj, konatuloj.

La vojo : paco La vocho : esperanto. Kaze ke vi havas demandojn, vi povas turni vin al Mirejo Grosjean, CH-2416 Les Brenets, mirejo.mireille che [gmail.com](mailto:mireille@gmail.com)

Sendita el Krakovo (dankon al Andrzej):

Europa Sociala Forumo (ESF) Istanbul ? Organizajho: <http://freemail.web.de/>

lau: Judith Dellheim <judith.dellheim@web.de>

Demando por interesuloj je ESF: Chu vi interesighas, kion vi faras, chu vi partoprenos la ESF en Istanbul ?

Traduko-projekto de AVE (de): <http://100-gute-gruende.de/lesen.xhtml>

100 Bonaj Argumentoj kontraŭ la Atomenergio - intertempe trovebla en Esperanto sur: <http://www.verduloj.org>

Kongresoj - AVE: partoprenos je la UK 2010, kaj je la franca kaj germana kongreso en Kaiserslautern.

AVE intencis partopreni Heerlen_8, la renkontigho de individuaj subtenantoj de la Europa Verda Partio.

Eble ni diskutu la **Novan Helpalfabeton**, i.a. por Esperanto: <http://pagesperso-orange.fr/kavlan/nha/nha.html>

Junio 2010 Kopenhago: Velo Global City: Granda renkontiĝo de biciklo-uzantoj (temas pri praktika sur strata **bickilado & urba-planado**) okazos en Kopenhago en junio 2010. <http://www.bikeleague.org/> (de Neil)

2010-09-10-12, **St. Andreasberg**/Harz (Haus Sonnenberg), **Semajnfino pri Europa laboro**.

Ankorau serchata fakulo(j)

1. , kiu povas realisme prezenti konkretajn ŝancojn/eblojn por Esperanto en la nuna Europa Unio, en la instancoj kaj inter la civitanoj. Tio por grupo de (ch. 10) ne-esperantistoj por veki ilian intereson pri Esperanto.
2. kiu povus doni al ni (ch. 10) esperantistoj konkretajn ideojn pri tio, kion ni vere povas postuli de niaj parlamentanoj ktp., do strategian planon por la laboro de tiu chi komisiono.

Referanto havos senpagan cheestadon kaj ricevos 360 eurojn. Partoprenkotizoj estos 120 euroj en dulita / 130 euroj en unulita chambro. Por la membroj de la Europa Komisiono de GEA: <europo@esperanto.de> (lau Rudolf Fischer, GEA)

2010 - Januaro : **Bonan Novan Jaron por vi - sanon, felichon kaj sukcesojn - Naj bondeziroj:**

Politike ni deziras: Abolicio de

Atomenergio, Mortpuno, Torturo, Diktaturo, Fanatismo, senlima rapideco de automobiloj en Germanio.

Pli da demokrata partopreno sur chiuj sociaj niveloj.

Pli da ekologia respekto kontraŭ la alia vivantaro.

Milito kiu respektas la civilulojn - jen nur unu el la malbonaj agoj (bombado de benzin-kamionoj kiam mortis pli ol cent homoj - parte civiluloj ...) Germanio montris ne nur fanatike stultan sed fakte kruelan kunlaboremon kun Usono por neniigi fanatikulojn, t.n. Taleban (Koran-studentoj).

Necesus subteni la strukturojn en tiaj landoj (Afghanio, Somalio, Palestino), kiuj plibonigus la viv-situacion de la homoj. Nur tiel ebligas redukti la mortigan fanatizmon.

AVE - Asocio de Verduloj Esperantistaj: <http://www.verduloj.org> - <AVE@verduloj.org>